EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**


- AMO 69, 70 kaj 71
- <Landa Parad'> aktualigo
- Filozofio de Martinus vokas
- Samarkando konigas nian lingvon


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-53 sendita el Budapeŝto, la 20an de novembro*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO kreskas - eĉ plia seminario ĉi-jare

Tumultas la AMO-programo. Ankoraŭ du seminaroj en novembro, kiel jam anoncitaj:

**AMO 69** en Norvegio (nov 21 ekde 15:00 CET) pri perspektivoj por Nordio (NEL jam arigis 37 partoprenantojn el 8 landoj, al kiu aldoniĝos kelkaj el la listoj de AMO)> Intervenoj apartenu nur al la skandinavia/nordia regiono. Alparoloj malpri tio estos haltigitaj.

**AMO 70** ekde 14:00 CET en la **29a de novembro**. Notu, la seminario estas prokrastita je precize 24 horoj, por ne kolizii kun alia grava retkunsido pri Eo-Centroj. AMO 69 temos pri la rejunigo de la eŭropa komunumo. Duono de la seminario estos plene prizorgata de TEJO. Aliro por AMO 69 kaj 70 jam iris al petintoj.

**AMO 71**! Lastmomente, jen la anonco pri unu decembra seminario, el ege grava lando – Ĉinio. Ĝi rolis pionire en la AMO-programo per okazigo de la rekorde longa seminario, en Siano (Xian) tra kvar semajnoj en aŭgusto 2014 (vidu la foton sur la sekva paĝo). Dum longa tempo temis pri la seminario kun la plej granda nombro de partoprenantoj -- 65. La nuna seminario okazos kadre de Zamenhofaj festoj tra multaj ĉinaj urboj. AMO 71 havos dekon da kontribuantoj el diversaj disaj partoj de la landego. Kiu emus kritiki la unulandecon – pensu: tio ekvivalentas al seminario en Eŭropo kun partopreno el deko da landoj – de Portugalio kaj Ukrainio. Jen la informoj:

Dato: la 14an de decembro (lunde). 13a nokte por Ameriko (dimanĉe).

Horoj: 14:00-16:00 Pekina tempo.

Aliaj lokoj: CET ekde 07:00, GMT 06:00, EST 23:00, PST 20:00.

Temo: 'En 2021 kiel kreive antaŭenpuŝi Esperanto-movadon'.

UEA salutos kaj enkondukos la aranĝon, emfazante la pli larĝan rolon, kiun Ĉinio povus ludi por la tuta movado en Azio.  Tiu aranĝo estos prizorgita per la platformo *Tencent*, ĉar aliro al *Zoom* estas problemiga tie.




## <Landa Parad’> por Azio, Eŭropo kaj MONA aktualigitaj kaj afiŝitaj

La postsekvo de la iama Jarlibro pri Landa Agado estas ĝisdatigita ĝis la 6a de novembro 2020 por la kontinentoj Eŭropo kaj Azio kaj la regiono Mez-Oriento kaj Nord-Afriko (MONA). Trovu ilin en la retejo de UEA <aktivulo.net> en la sekcio ‘Landa agado’. Plie en <aktivulo.net> , la arĥivo de EKO-komunikoj tra 2020 estas ĝisdatigita de 33 ĝis numero 49, aperinta en oktobro. Vidu sub ‘Agadraportoj’.



## La filozofio de Martunus invitas

Aperis la novembra numero de la ret-versio de Kosmos en Esperanto.Elŝutu tion:

https://www.martinus.dk/eo/la-revuo-kosmos/

Retpoŝte vi senpage povos aboni la elektronikan version de Eo-Kosmos, se vi sendos vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk

Pri la enhavo de eo KOSMOS n-ro 1, 2020

**Simbolklarigo**: La eternokorpo

**Martinus:** Kristnaska etoso


**Martinus:** Spirito kaj elektro

**Ole Therkelsen:** La sekreto de la piramido – parto 3/3 (Ole sur la foto)

**UEA:** UNESCO eldonis libron en Esperanto

Vi povas malaboni ĉe la adreso esperanto@martinus.dk.

Ole Therkelsen: www.oletherkelsen.dk; www.martinus.dk/eo



La foto de Ole aperis en la anglalinva retejo de Martinus, kie li anglalingve liveris tri prelegojn, kaj klare ludas gravan rolon

# Kongresa Universitato denove en 2021

Kadre de la 106-a UK en Belfasto okazos la 74-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. La rektoro estos prof. Michele Gazzola kaj helpos al li prof. Reinhold Medina. UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al la IKU-sekretario (amri@huji.ac.il). La proponoj alvenu plej laste la **15-an de januaro 2021**. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu prelego kadre de la IKU kaj el du kromaj prelegoj. Tiuokaze bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso. Estas planate organizi la Belfastan UK hibride, do ankaŭ la IKU-AIS-prelegoj estu kaj ĉeestaj kaj virtualaj. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: uea.org/kongresoj/universitato.



# Samarkando aktivas

La Internaciaj Letertagoj "Vorto pri Samarkando 2020", dediĉitaj al la Tago de la Urbo, bonorde sukcesis. Alvenis al Uzbekio multaj gratulleteroj kaj aliaj materialoj el plej diversaj anguloj de la terglobo. Pluraj salutleteroj estis publikigitaj en nialandaj retaj kaj paperaj nacilingvaj periodaĵoj.

Aperis 3 retaj kaj 3 paperaj ampleksaj artikoloj. Vidu la ĉi-subajn retligilojn:

http://sv.zarnews.uz/post/jivi-vechno-samarkand

http://sv.zarnews.uz/post/jivi-vechno-samakad

https://www.kultura.uz/view_2_r_15672.html

La vortoj Esperanto/esperantistoj' multfoje renkonteblas en la publikigitaj tekstoj.

Anatolij Ionesov, la Enciklopedia projekto "Samarkandiana"
P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando, Uzbekio

imps86@yahoo.com











======= vortoj: 600 ========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.